

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

Ĉio suba okazos en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

★ KURSOJ

Unu-taga kurso - apr. 18, 15h00-17h00, 300 enoj.

Rudimenta kurso - de apr. 25 ĝis jul. 18, 15h00-17h00, 6000 enoj.

★ HAMA-RONDAJ VESPEROJ

Marte: Pri Francio kaj tiea esperantista vivo

*mar. 21, 17h00-19h00

S-ino Audibert Kazue, japanino loĝanta en Parizo parolos, okaze de vizito hejmlanda.

Aprile: pri Montevideo 60

*apr. 18, 17h00-19h00

UEA lanĉis kampanjon nomatan Montevideo 60. Nome en la lasta aŭtuno pasis 60 jaroj de la ĝenerala kunsido de UNESKO, kiu agnoskis la rolon de Esperanto, kaj okaze de tio en tiu ĉi jaro oni retaksu la aferon. En la kunsido, oni klarigos la rilaton de UNESKO kaj Esperanto, kaj pripensos la nunan situacion.

Maje: pri Ĝemelaj urboj kaj ties rondoj

*majo 16, 17h00-19h00


Urbo Jokohamo havas kelkajn ĝemelajn urbojn, kaj ni esperantistoj havas rilaton kun esperantistoj en tiuj urboj. Ni parolos pri la okazo de Odeso en Ukrainio ktp.

TIEL OKAZIS

Prelego pri Esperanto al civitanoj
*feb. 8, 17h00-18h00, en la domo de JICA en Jokohamo

Kadre de la Jokohama Internacia Forumo, nia rondo prelege prezentis antaŭ 8 aŭskultantoj pri Esperanto. Unue Mijazaki Hideko parolis, i.a. pri sia sperto utiligi Esperanton. Poste Fuse Kentaroŭ klarigis pri la lingvo mem.

S-ro Fuse klarigas Esperantan gramatikon. →




- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

Hama-Ronda Vespero pri UK

*feb. 21, 17h00-19h00, en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa

Ĉi-jare okazos la 100-a Universala Kongreso en Lillo en la norda parto de Francio. S-ro Christian Couvez, franco kreskinta en tiu distrikto, parolis pri la vidindaĵoj tie. Li, loĝanta en Kawasaki, fakte estas relative nova esperantisto, iom pene tamen klare klarigis. Aldone, s-ino Doi Ĉieko prezentis koncize la historion de la Universalaj Kongresoj, eltirinte informon el "Sed homoj kun homoj". Ĉeestis 23 personoj.



ESEJOJ

Telefono al avĉjo — murmuroj de avĉjo —

KOYAMA Takesi

Iun posttagmezon telefono vokis min.

— Ĉu vi estas s-ro K.? —
Junulo diris.

— Jes, mi.

— Ĉu vi estas s-ro T. K.? — Li diris eĉ mian personan nomon.

— Jes, mi estas. — Sed mi suspektis kiel li esploris mian nomon. Finfine trompisto *Ore-Ore** alvenis al mi, ĉu vere?

— Mi estas B de asekura kompanio. Hodiaŭ mi klarigas por vi nove vendatan asekuron.

— Momenton! Kiel vi eksciis mian nomon?

— Mi eksciis ĝin en telefonlibro. Mi telefonas laŭvice al urbanoj en la listo,— li daŭrigis fervore. — Por vi kaj urbanoj en Acugi ni preparis specialan planon. Mi rekomendas al vi, ke ĝi estas la plej utila defendo por urĝa okazo.

— Mi komprenis. Sed mi ne taŭgas por via tasko. Mi ne havas intereson pri vivasekuro. Ĉar delonge antaŭ ĉirkaŭ 30 jaroj mi estis rifuzita de iu asekura kompanio pro mia malsano: ftizo kaj hemoroido.

— Tamen nuntempe oni havas bonan asekuron por resaniĝinto, — li klopodis serioze.



— Dankon, sed nun granda muro staras antaŭ mi... Ĉu vi komprenas pri ĝi? ... Ĝi estas aĝo.

— Ne zorgu, sinjoro. Nia kompanio havas asekuron por altaĝulo.

— Ĉu ankaŭ viro de 80 jaroj povas mendi asekuron? Mi demandis.

— 80 jaroj? Ĉu vere? — Aŭdiĝis surprizita voĉo de la junulo.

— Bedaŭrinde nia kompania statuto validas nur ĝis 80 jaroj. Mi petas pardonon min, sinjoro T. K. Telefono silentis. Poste mi murmuris.

Ĉu grandaĝuloj valoras por ekzisto aŭ ne? Ĉu estas bona aŭ ne tio, ke elspezo kaj asekuro por kuracado de profundaĝuloj multiĝas pli kaj pli? Ĉu altaĝuloj devas atendi forpasi trankvile? Mi malfacile komprenas ilin. Mi ankoraŭ ne trovis solvon. Por mi ili estus eternaj demandoj...

**Ore-Ore* estas laŭsence "Mi-mi". Estas tipa trompo, ke junulo mensoge kredigas al telefonricevanto esti ties filo, kaj petas ekzemple "Mi fuŝe perdis monon de mia laborejo, do mi devas rekompenci. Donu al mi, via kara filo, monon por tio".

Inĉonaj esperantistoj

Mizro Iwaya

Fine de januaro, ĉijare, mi vizitis korean urbon Inĉono, norde de Seulo. Fakte mia vizito estis laŭ mia oficejojaĝo, sed mi provis kontakton kun tieaj esperantistoj laŭ la konsilo de Sunjo, s-ino Fuĝimoto. Kvankam mia kontakto estis tro abrupta, t.e. en ĵaŭdo kaj mi devis forlasi Koreion en vendredo, Avo, s-ro Hong, tuj aranĝis renkontiĝon kun mi. Dum la telefonado mi facile rimarkis ke li bone parolas Esperanton. Do ankaŭ mi ekhavis allogan intereson al li.

La 29an, vespere, ili venis al mia oficejo triope. De tie ni veturis al proksima manĝejo. Avo klarigis ke ĝi estas tre fama marestaĵa manĝejo, kiun ankaŭ seulanoj vizitas ofte. Tie ni komune havis vespermanĝon. Mi ne scias la nomon de la kuirado, sed la enhavo estis buntaj specoj de konkuloj kaj moluskoj, kompreneble bongustaj.

Ili loĝas en Inĉono aŭ proksima Buĉono. Ili estas gravaj aktivuloj: ekz. Avo estas eksprezidanto de Inĉona Esperanto-Societo kaj Ĝoja estas redaktoro de la organo de KEA "La Lanterno Azia". Ili bone parolas Esperanton. Ni ĉefe parolis pri esperantaj amikoj en Japanio kaj Koreio nuntempaj kaj estintaj.

Post la manĝado ni veturis marbordan regionon. La sceno estis bela, kvankam vespera mallumo ne permesis al ni kompletan aprezon. Ni trovis diversajn promenantojn laŭ la plaĝo. Se estus somero, multaj spektantoj svarmus sur la strando, diris Avo. Nia renkontiĝo ne finiĝis per tio sola. Ni kune iris al mia hotelo kaj daŭrigis nian babiladon tie.

Se mi havos alian ŝancon viziti Inĉonon, mi deziras renkonti ilin refoje.



Novaĵoj jokoĥamaj

Brulaĵoĉela aŭto enkondukita

En tiu ĉi marto, kaj la Urbo Jokohamo kaj la Gubernio Kanagaŭa enkondukis aŭton, movatan de brulaĵoĉelo, nome aŭton fabrikitan de Toyota, kun la marko *Mirai* (t.e. Estonteco). Ĝia "brulaĵo" ne estas teraj fosiliaĵoj, sed hidrogeno, kaj post brulo ĝi ellasas nur akvon. Per la bruligo ĝi produktas elektron, kaj parto de la elektro estas tenata en la ĉelo. Por ke tia aŭto plimultiĝu, necesas instali hidrogen-staciojn en urbo, kaj tio estas ankoraŭ malfacila afero.

横浜のニュースから

燃料電池車を導入

この3月に横浜市と神奈川県はそれぞれ燃料電池車を導入した。トヨタ製のMiraiというブランドである。この燃料は化石燃料ではなく、水素であり、燃焼の後には水が排出されるだけである。燃焼にともない発電し、電気の一部は電池に蓄えられる。このような車が普及するためには市内に水素ステーションを設置することが必要だが、これはまだ難しい。

VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (4)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012

Eroŝenko skribis pri tiu tempo:

*Mi vagis sur tero, mi serĉis tra mondo,
Deziris mi trovi la fratojn amantajn,
Sed trovis aŭ monstrojn, aŭ bestojn sovaĝajn,
Aŭ ruzajn simiojn nur ĉion mokantajn.*

*Al frata salut' ili montras la dentojn,
Per mordo respondas manpremojn de l' frat',
Respondas per kraĉo la koran fratkison,
La fratĉirkaŭprenon per la perfidbat'.*

*Mi serĉis amikon kun varma fratmano,
Kun koro varmega, fidinda en tut',
Sed vane, mi trovis nur harpiedegojn(*)
Kun longaj ungegoj de l' ruza monstr-brut'.*

*Kaj nun mi laciĝis, mi volas ripozi
Profunde en kor' de l' patrin' - ter' amanta,
Profunde dormante, mi songos eterne
Pri frato-amiko, min ĉie serĉanta.*

Oktobre en 1921 Eroŝenko forveturis al Ŝanhajo. Tie li komencis instrui Esperanton en la Instituto de Mondaj Lingvoj, kaj en 1922 li ricevis inviton lekci pri Esperanto kaj rusa literaturo en Pekina Universitato. Post lia alveno, la nombro de studentoj de rusa fakultato kreskis de 15 ĝis 500! Komence “Ejlosjanjke” prezentis siajn lekciojn en Esperanto, sed baldaŭ li ekposedis ankaŭ la ĉinan lingvon.

En Ĉinio Eroŝenko sentis sin terure soleca: li preskaŭ ne havis tie amikojn, li ne povis esti en la centro de kultura kaj socia vivo, kiel tio okazis en Japanio. La stagna ĉiutageco de grandega feŭda lando terurigas lin. Kaj do, en 1922 li tra la tuta kontinento veturas al Helsinki, por 14-a Universala Kongreso de Esperanto. Li bezonas tion por “enspiri freŝan aeron” de aktiva vivo, por aliĝi al “tutmonda sociumo” - nur malgranda grupo tiam, ĉ. 850 personoj, kunvenintaj el ĉiuj teranguloj. Sed ĝuste ili enkarnigis en si lian ideon pri la “Lando de Ĉielarko” – komunumo de homoj, ne disigitaj unuj de aliaj per naciaj aŭ klasaj barieroj; tutmonda unuiĝo de homoj, parolantaj la saman lingvon kaj pro tio vere egalrajtaj inter si; societo, kie fortulo ne devoras malfortulon, kaj kie oni strebas ne al perforto por pliprofundigi malegalecon, sed al kuniĝo de egalrajtaj homoj

por komuna disvolviĝo. Tiaj estas ideoj de Esperanto, la t.n. “interna ideo”, kiu donis kaj donas al ĝi vivoforton, jam dum pli ol 120 jaroj subtenante ĝian ekziston, dum ĉiuj aliaj artefaritaj lingvoj fakte mortadis jam en lulilo, ne trovinte por si adeptojn. Vasiliĵ Eroŝenko kredis je tiu ideo, ideo de tutmonda frateco. Por ĝi li vivis, per sia tuta vivo konfirmante kaj asertante tiun ideon. Esperanto estas la lingvo-peranto, ne altrudanta sian mondkoncepton, sed kreanta kondiĉojn por absolute egalrajta komunukiĝo kaj kultura interŝanĝo. Eroŝenko dekomence iĝis esperantisto, t.e. homo, kiu pensas en kategorioj de unuigita homaro kaj egalrajteco de ĉiuj kulturoj; kaj ĝuste tial li sukcesis tiel profunde akcepti en sin aliajn lingvojn kaj kulturojn, tiel plene esprimi sin en alia lingvo... Ja tio, kion li verkis, estis kreita en la lingvo de la koro; kaj tiu lingvo estas la sama por ĉiuj popoloj...

Por delegitoj de la Kongreso Eroŝenko laŭtleĝis sian rakonton “La tago de tutmonda paco”; pri tio, ke triumfo de venkintoj portas en si morton, sangon, larmojn kaj semojn de estonta milito. La delegitoj, kiuj ĵus travivis la tempon de revolucioj kaj militoj, ne aplaŭdis. Ili silentis. Ili komprenis Eroŝenkon.

La vivo en Ĉinio post la reveno de l' UK iĝis eĉ pli severa. La registaro persekutis tiun “internaciiston”, la kvanto de studentoj en liaj lekcioj draste reduktiĝis: kiu ja deziras esti kunligita kun suspektinda alilandano, fremdulo...
(daŭrigota)

(*) 毛むくじゃらの脚

Niaj Klasoj kaj Kursoj

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; oni lernas per “Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ” / (2) Klaso por legado de “Hispana, Kataluna, Mangada...” / (3) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj”.

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas “Rakontoj sub la lito” de Antoaneta Klobučar. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de “Hanako lernas Esperanton”.